


# POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj.

## ESPERANTYSTA POLSKI

Organ Towarzystw Esperantystów Polskich.

Oktobro 1908.



Jaro I (III). № 10.

Redakcia Komitato:

Komitet Redakcyjny:

Redakt. D-r Leon Zamenhof

Dr. K. Bein (Kabe)  
Leo Belmont  
A. B. Brzostowski

Ks. Prof. A. Dąbrowski  
Antoni Grabowski  
A. Zakrzewski

Al la Komitato helpas per siaj konsiloj la Aŭtoro de Esperanto

**D-r Ludwik Zamenhof.**

### ENHAVO:

„Konkurantoj de Esperanto“, Leo Belmont. —  
Eĥoj el la kongreso. — „Sur Jungfraŭ“, M. Ko-  
nopnicka, trad. A. Grabowski. — „El Dezerto“,  
Gorgan. — Kroniko. — Bibliografio.

### TREŜĈ:

„Konkurenci Esperanta“, Leo Belmont. — Echa  
z kongresu. — „Na Jungfraŭ“, M. Konopnicka, prze-  
kład A. Grabowskiego. — „Z pustyni“, Gorgan. —  
Kronika. — Bibliografja.

Adreso de la Redakcio:

WARSZAWA,  
(Varsovio)  
Marszałkowska 143.

Abonprezo — Prenumerata

Jare — rocznie: 2 rb. = 5 fr. = 4 mrk.  
kun transsendo kaj aldono literatura.  
z przesyłką i dodatkiem literackim.

Adreso de la Administr.:

WARSZAWA,  
(Varsovio)  
Hoża № 20, m. 12.

# F. Kozłowski OBECNI S. NOWACKI

Warszawa, Rymarska 7, róg Leszna. — Telefon 39-99.

NAJTAŃSZE ŹRÓDŁO: Lamp, Porcelany, Fajansu, Szkła, Galanteryi, Noży, Widelcy etc., etc. Wynajmuje nakrycia stołowe, platery, bieliznę, krzesła, stoły.

ŻYRANDOLE kościelne i salonowe do świec i gazu. Wielki wybór. Najniższe ceny. Reperacje i odnawianie żyrandoli.

W wielkim wyborze przyzmy kryształowe do żyrandoli. Jedyne palnik naftowo-żarowy bez wszelkich komplikacji 60% oszczędności nafty. Komplet rub. 3.

## ZAKŁAD BRONZOWNICZY W. Komorowski i S<sup>-ka</sup> WARSZAWA

Nowy-Świat № 12. — Telefon № 188-82.

Wykonywa do elektryczności: Żyrandole, lampy, pendle plafonierzy i t. d. — Cenniki ilustrowane na żądanie.

## Fabryka i Magazyn J. Kuczmierowski

Warszawa, Marszałkowska 108.

Poleca: Siodła, zaprzęgi, przybory podróżne, oraz galanteryę skórzaną w wielkim wyborze.

Cenniki na żądanie.

## SKŁAD MEBLI

Majstrów Stolarskich

### Jana Berezińskiego

w Warszawie, ul. Królewska 6.  
wprost Mazowieckiej.

ROBOTY TAPICERSKIE  
Dekoracje stylowe i fantazyjne.

Telefon 51-52.

**„MODERNE”** Wyborne MYDŁO  
**F. PULS.**  
TOW. AKC. w WARSZAWIE  
DOSTAĆ MOŻNA WE WSZYSTKICH LEPSZYCH PERFUMERJACH.

## „ŚWIAT”

TYGODNIK LITERACKI ILU-  
STROWANY POD REDAKCJĄ  
STEFANA KRZYWOSZEWSKIEGO.

Adres Redakcji i Administracji: Warszawa, Aleje Jerozolimskie 49.

Przedpłata „Świata“ wynosi: w Warszawie rocznie rb. 8, pół-  
rocznie rb. 4, kwartalnie rb. 2, na prowincji rocznie rb. 9, pół-  
rocznie rb. 4.50, kwartalnie rb. 2.25, zagranicą rocznie rb. 12,  
półrocznie rb. 6, kwartalnie rb. 3.

## MAGAZYN

Optyczno-Elektrotechniczny

## F. Czerwiński & C<sup>o</sup>

WARSZAWA

Krakow.-Przedmieście 37.

## Oficejo Instruista de K. Wasilewski

Strato Marszałkowska 123.

Rekomendas instruantojn,  
instruantinojn kaj guver-  
nantinojn diversajn.

## Skład Papieru R. KRUPECKI WARSZAWA,

Wierzbowa № 1. — Telefon 10-16.

POLECA: Materiały piśmienne i rysunkowe. Księgi buchalteryjne i t. p. Dostawa do biur i kantorów.

# Grava alvoko.

Dezirante kunigi la tutan esperantistan movadon en Polujo kaj prepari materialon statistikan de tiu ĉi movado, ni malfermis la nomaron de ĉiuj polaj esperantistoj. Ni insiste petas ĉiun esperantiston en Polujo sendi sian nomon, adreson, okupon. En la fino de ĉiu jaro ni alsendos al ĉiuj niaj abonantoj apartan represaĵon de tiu ĉi nomaro dum la pasinta jaro.

## Nomaro de Polaj Esperantistoj (DAŬRIGO).

**Bocheński Józef**, Moskvo, Industria Komerca Societo, str. Miasnickaja 8 der. koresp.  
**Bojarski Lucjusz**, kuracisto, Włoszczowa, gub. Kielecka.  
**Dąbrowska Marja**, Lublin, Krakow.-Przedm. 155.  
**Dorowski Władysław**, Lvovo-Galicio, Zamojska 9.  
**Dzierżawski Walenty Adam**, „Walentynów“ gub. Warszawska, poŝto Żychlin.  
**Fonferko Kazimierz**, inĝeniero. Krakovo, str. Mikołajska 28.  
**Gacki Edward**, Radom, str. Lubelska 73, komerc-lernanto.  
**Janowski Stanisław**, Varsovio, str. Bracka 20, dez koresp. per ilustr. poŝtkartoj.  
**Jaroniówna Helena**, Krakovo, str. Poniatowskiego 8.  
**Josicz Aleksander**, fervoja maŝinisto, st. Koliuszki.  
**Koźmian Aleksander**, poŝta Wyszki, gub. Witebska, „Arendol“.  
**Krachulec Zygmunt**, komercisto, Sosnowice, str. Modrzejowska 1.  
**Kurelsk Witold**, Łomża, str. Senatorska, lernanto.  
**Loth Emiljan**, studanto de hemio. Svisujo Zürich, Platterstr. 88.  
**Mallsburg**, kuracisto, Brzezany, Galicio.  
**Nowakowski Jan**, Czernichowo, Galicio.

**Nowelt Józef**, Lublin, Namiestnikowska 309.  
**Pęksa Stanisław**, studento de juro. Nowy Sącz, Dworzec, Galicio.  
**Schubert M. Bernard**, filologo, New-Jork. Avenue de Washington D. C. Usono.  
**Zreimizak-Cziweżałb**, Krakovo, Uniwersitato, studento de filozofio.

## KIELCE.

**Borkowski Piotr**, notario, Kielce—Wesoła.  
**D-ro Dobrzański Stefan**, med, Kielce—Rynek.  
**Dobrzańska Marja Anna**, doktoredzino, Kielce—Rynek.  
**Dobrzański Stefan Andrzej**, juristo, Kielce—Rynek.  
**Dobrzański Roman Iwo**, studento, Kielce—Rynek.  
**Glixelli Stanisław**, Kielce—Tadeusza.  
**Podladowska Miła**, studentino.  
**Samsonowicz Jan**, ternanto, Kielce—Szkółka Handlowa.  
**Sokołowski Jerzy**, studento, Kielce—Wesoła.  
**Sokołowski Stefan**, juristo, Kielce—Wesoła.  
**Sokołowska Janina**, Kielce—Wesoła.  
**Tuhan-Baranowska Wanda**, Kielce—Niecała.  
**Tuhan-Baranowska Józefa**, Kielce—Niecała.  
**Tuhan-Baranowska Jadwiga**, Kielce—Niecała.  
**Zaboklicki Antoni**, Kielce—Skład Monopolowy.

## Lista Członków P. T. E. — Nomaro de la membroj de la P. E. S.

(Daŭrigo).

Akselrod Maks, Pawia 1.  
 Bleszyński Tomasz, Wspólna 28.  
 Borenstein Dorota, Nowy Świat 15—2.  
 Borkowska Stefanja, Rybaki 30—6.  
 Borodzicz Jan, Hoża 50—5.  
 Brzęczek Stanisław, Ciechanów.  
 Chełmoński, Piotr, pom. zawiadowcy Jackowice.  
 Ciechanów Cecylja, Złota 36—3.  
 Cukier Marcelli, Zielna 6.  
 Czellin Barbara, Żelazna Brama 6.  
 Degler Piotr, Paweł, Złotoust, Rumianczewska 39—4.  
 Dmochowski Stanisław, aptekarz, Puławy.  
 Dobrzański D-r Stefan, Kielce.  
 Drankow Irena, Twarda 15.  
 Dubrowicz D-r Ignacy, Wiedeń, XIX Leidesdorf-gasse 7.  
 Dybowski Prof. D-r Benedykt, Wojnów, g. Mińska.  
 Elżanowski Stanisław, Płock, Królewska 209/21.  
 Goldberg Wolf, Miła 17—3.  
 Gołębska Wanda, Aleje Jerozolimskie 74—4.

Gruszczyński Władysław, Wilcza 22—18.  
 Heppner Marjan Stanisława, Praga, Łamana 7.  
 Hirszhorn Henryk, Nowogrodzka 22—16.  
 Hirszowski Władysław, Erywańska 4—29.  
 Jasiński Kazimierz, Żelazna 51.  
 Jaworski K., Praga, Sprzeczna 3.  
 Kalend Zygmunt, Krakowskie-Przedmieście 32—12.  
 Kępiński Henryk, Włodzimierska 12.  
 Kon Feliks, lekarz-dentysta, Marszałkowska 68.  
 Kossowski Zygmunt, Nowogrodzka 23.  
 Kowalski Kazimierz, Sochaczew, dom własny.  
 Kowalczyk Stanisław, aptekarz, Kalisz.  
 Kriwicka Elżbieta, Zielna 31—5.  
 Majzel D-r, Nowy-Świat 17.  
 Makowska Aleksandra, Żórawia 21—27.  
 Malingier Hilary, Ogrodowa 18—21.  
 Malézieux Virginie, Niecała 12—25.  
 Mierzejewski Marcin, Borowina, przez Iwangród.  
 Młodkowski Tadeusz, Nowogrodzka 19—23.  
 Mucha Bernard, S-fo Jerska 16—50.

(Daŭrigo sekvos).

# AVIZOJ

ZARZĄD POLSKIEKO TOW. ESPERANTYSTÓW zawiadamia, że co 3 miesiące odbywać się będą egzamina na dyplomy esperanckie. Najbliższy egzamin — w końcu b. m. Zapisy w kancelarji.

PROWINCJONALNI CZŁONKOWIE Towarzystwa, zalegający w opłacie składek członkowskich, proszeni są uprzejmie o jaknajszysze wniesienie takowych.

Wyszedł z druku dokładny spis delegatów Uniw. Związku Esperantystów (Uniw. Esp. Asocio) w całym świecie. — Oficiala Jarlibro de U. E. A. por 1908. Cena 16 kop. Do nabycia w Kancelarji Tow. od 8—9 wiecz.

Odbyło się 26 z. m. organizacyjne zebranie Sekcji lekarskiej przy Polskim Tow. Esperantystów. Obecnych było 20 lekarzy, którzy zapisali się do Wszechświatowego Związku Lekarzy-Esperantystów. Opłata członkowska wynosi rocznie Rubli 2, za co członek związku otrzymuje bezpłatnie pismo lekarsko-esperanckie „Voĉo de Kuracistoj“. Zapisy przyjmują D-r Róbin (Warszawa, Senatorska 30) i D-r Krukowski (Warszawa, Elektoralna 31).

W tych dniach rozpocznie się kurs wyższy języka Esperanto, prowadzony przez p. A. Grabowskiego. Zapisy w kancelarji Towarzystwa.


CZŁONKOWIE TOWARZYSTWA proszeni są o zapisywanie się do kółka dramatycznego i do chórów.

**Od Administracji** Załącza się „En fumejo de l' opio“ jako dodatek literacki do Numerów 9 i 10.


**Uprasza się półrocznych prenumeratorów o odnowienie prenumeraty za II półrocze.**

# POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj



## ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Towarzystw Esperantystów Polskich

Oktobro, 1908.

WARSZAWA — VARSOVIO.

Jaro I (III). № 10.

## Konkurenci Esperanta.

Od czasu do czasu niektórzy reporterzy nasi — chwytają chciwie informacyjną piankę z prasy zagranicznej i donoszą nam, że „urodził się nowy język międzynarodowy“. A do tych informacji — nawet o próbach najniedołężniejszych, o efemerydach jednodniowych, dodają zazwyczaj znaczące mrugnięcie okiem: „a toż tych języków międzynarodowych napłodzi się bez liku; skoro wiadomo, którego się uczyć, nie warto uczyć się żadnego!“ Lub poprostu wypisują: „i znowu pojawił się groźny konkurent dla języka Esperanto.“

Te „niewinne“ wzmianki, niestety, szkodzą rozwojowi sprawy języka międzynarodowego u nas, bo lenistwo myśli chętnie się ich czepia, jako osłony przed zarzutem odsuwania się od Esperanta. „Przecie szkoda czasu na uczenie się Esperanta — powiadają nam ludzie „ostrożni“ — podobno już pojawił się lepszy język... A jutro pojawi się jeszcze lepszy“...

I zdecydowani są czekać do dnia sądu — na ów najlepszy ostateczny język...

Gdyby cała ludzkość składała się z podobnie rozumujących jednostek, ani jeden wynalazek nie znalazłby na świecie zastosowania...

Ale w stosunku do Esperanta w rozumowaniu tym tkwi prócz lenistwa myśli, pewien błąd zasadniczy, który pragnęlibyśmy wyświecić...

Lecz przedtym słówko o nowym konkurencie Esperanta „Sol-re-sol’u“, o którym świeżo przyniosły nam wiadomość nasze pisma.

Tym razem wprawdzie znaczącego mrugnięcia okiem nie było. Przeciwnie reporterja powitała śmiechem „Sol-re-sol.“ Do takiego stop-

nia pomysł jego twórcy uderzył informatorów swoim komizmem.

A jednak — tym razem popełniono... dwa błędy.

Pierwszy, że „Sol-re-sol“ ogłoszono za nową próbę... Drugi, że śmiano się tak bez pardonu.

Sol-re-sol chyba nie jest nową próbą, skoro sięga początkiem swoim 1817 roku! Zarazem twórcą jego — wbrew doniesieniu pism — nie jest polak, ale francuz, który ongi objeżdżał Francję wszere i wzdłuż, proponując swój język, a umierając pozostawił dość znaczny kapitał w rękach przyjaciela-polaka, na którego włożył obowiązek wygłoszenia co rok odczytu o Sol-re-solu. Obowiązek ten prawem spadku wraz z odnośnym funduszem przeszedł na innego Polaka, który tego roku w myśl spadkodawcy wygłosił doroczny odczyt o Sol-re-sol’u... przyciągnąwszy nań 7 słuchaczy.

Liczba słuchaczy śmieszna — ale to wcale nie znaczy, aby pomysł Sol-re-sol’u był w zasadzie śmieszny. Autor proponuje ułożenie wszystkich słów z siedmiu sylab, oznaczających nuty: „Do-re-mi-fa-sol-la-si“ przez łączność ich i powtarzanie w najrozmaitszym porządku. Tym sposobem prócz języka mówionego i pisanego, powstałby język grany i śpiewany — poprostu nutowy, przez wydobywanie odpowiednich dźwięków w porządku, odpowiadającym układom słów. Zastępując zaś nuty siedmiu kolorami tęczy, zyskałoby się nadmiar język malowany.

Pomysł ten napotkano śmiechem, jako niemożliwy — i to właśnie jest niesprawiedliwym. Jest on tylko niepraktyczny, ponieważ nastęcza

trudności, nieopłacających wygód z jego przyjęcia — i już jest przeżyty wobec znalezienia sposobu, prowadzącego do tego samego celu, z tysiącokrotnie mniejszym nakładem myślowych sił.

Powiadam: „Sol-re-sol“ w zasadzie nie jest śmieszny, bo niewątpliwie siedem elementów kombinowanych po 2, 3, 4 i t. d. z prawem powtarzania się (np. *Sol-re-sol*) starczyłoby do obleczenia tysięcy pojęć w odmienny kształt wyrazowy. (Por. kombinacje matematyczne Newtona). I nie powinna nas zadziwiać mała ilość elementów, przyjęta przez twórcę za podstawę przedczy całego języka: boć podobnie cały materiał mowy naszej układa się z dwudziestu kilku dźwięków, a takąż ilość znaków wystarcza do wyrażenia wszystkich naszych myśli na piśmie. Trudność ideografii chińskiej, z którą wiąże się konieczność analfabetyzmu mas i połowiczna piśmienność nawet wysoko ukształconych wynika stąd właśnie, że chińczycy nie zaoszczędzili sobie pracy pamięciowej, nie wynaleźli krótkiego alfabetu i posiadają bez porównania więcej elementów graficznych, niż my.

Nasz alfabet telegraficzny dowodzi, że oszczędność w użyciu elementów dla pewnego układu może zajść niezmiernie daleko — bo z konieczności fizycznej nawet do dwóch tylko: kropki i kreśki, znaczonej przez prąd elektryczny szybkimi przerwami, lub dłuższymi naciśnięciami na rączkę aparatu. Tu dwa znaki, przez rozmaity układ i powtarzanie się w różnej kolejności i ilości, zastępuje 24 litery i daje możliwość wyrazić cały zapas myśli ludzkich.

Ale zarazem alfabet telegraficzny okazuje się trudniejszym od zwykłego i tylko *mus* sprawił, że został przyjęty — dla celów specjalnych; posiadają go też tylko specjaliści.

Otóż trzeba mieć na względzie, że oszczędność w liczbie elementów jakiegoś układu posiada pewne granice. Jak niepożądaną jest wielka ich mnogość, ponieważ obciąża pamięć i przedłuża czas nauki w celu przyswojenia podstawowego materiału, tak samo wypada się strzedz zbytnej oszczędności, bo wówczas szybkie przyswojenie elementów nie wynagrodzi pamięciowej trudności w rozróżnieniu układów, z konieczności zbyt podobnych do siebie przy mniejszej ilości żywiołów składowych. Zasadą bowiem jest: im mniej składników posiada dany system układów, tym bardziej odrębne układy podobne są do siebie.

Psychologicznie niepodobna sobie wyobrazić, abyśmy zdolni byli nauczyć się na pamięć zna-

czenia kilku tysięcy słów, złożonych jeno z siedmiu jednakowych sylab. Płatałyby się one ciągle w naszej pamięci przez zbytnie podobieństwo. A że nadmiar te same sylaby powtarzałyby się w wyrazach po parękroć, słuch nasz nie byłby w stanie odróżnić, gdzie się kończy jedno, gdzie zaczyna drugie słowo \*).

Ilość nieporozumień z powodu bliskości dźwięków i dwuznaczników w zwykłej mowie jest stosunkowo ograniczoną, dlatego że sylabowy materiał z 24 dźwięków nieporównanie przewyższa siódemkę *Sol-re-sol*'u i daje pole o wiele bogatszym kombinacjom.

Twórca *Volapüku* Schleyer również zbyt mało liczył się z psychologią pamięci, kiedy wydawało mu się, że uczniowie jego zapamiętają różnice pojęciowe pomiędzy mnóstwem słów niezmiernie podobnych, jako to: *nek, näk, nög, neg, näg, nög*.

Pierwszeństwo Esperanta nad wszystkimi dotychczasowymi i późniejszymi próbami polega na tym, że twórca jego szczęśliwie uchwycił proporcję: nie jest on ani zbyt rozrzutnym, ani zbyt oszczędnym. Stąd łatwo posiąść elementy składowe jego języka — i łatwo odróżnić układy tych elementów.

Bo też w samej rzeczy Esperanto nie jest ani wynalazkiem, ani odkryciem.

Jest on jednym i drugim zarazem.

Jest on odkryciem przez to, że odkrywa to, co w językach naturalnych jest najlepsze, najlogiczniejsze i przyswaja sobie ten cały materiał „organiczny.“

Jest wynalazkiem tam, gdzie sztuką kulturuje naturę, gdzie ją ulepsza, usuwając trudności i zbyteczną złożoność przez jakiś pomysł niezmiernie prosty. Tu sztuczność jest prostszą od naturalności.

Jednym z najwartościowszych pomysłów twórcy Esperanta było przyswojenie językowi międzynarodowemu całego już istniejącego słownego materiału międzynarodowego. Toć jeszcze Schleyer tworzył wyrazy dla nazwania „matematyki“ (*gletav*), Afryki (*Fikop*), Ewangelji (*gospel*) i t. d. Ba! najprostsze prawdy są te, do których ludzkość najpóźniej dochodzi. Trzeba było wielu prób i kilku stuleci (poczynając od Leibniza), zanim na gruncie języka międzynarodowego urodziła się taka prosta myśl, jaką jest nazwanie

\*) Np. *Farefa re* brzmi podobnie, jak *fare fare*, albo jak *fa refare* lub *fa refa re*.



matematyki — „*matematiko*“. Esperanto odkrywa właśnie tę drogę *prostą!*

Dlatego setne próby języków, które na wzór „Sol-re-sol'u“ zalecają *tworzenie wszystkich słów*—miast przyjęcia gotowych—są błędzeniem po pustyni i nie mogą konkurować z Esperantem.

Język Zamenhofa musi być przyjęty przez ludzkość nie dlatego, że jest ostatecznie doskonały, idealny — ale dlatego, że twórca jego wszedł na najlepszą, najpraktyczniejszą, *najdoskonalszą drogę*.

Język Esperanto to *metoda*.

Niepodobna się jej wyrzec na drodze do porozumienia się ludów, jak niepodobna wyrzec się na drodze nauki indukcji.

Esperanto nie boi się konkurentów. Bo ci twórcy języka, którzy pójdą nie jego drogą —

błądzą, schodzą z prawidłowej drogi. Ci, którzy idą po jego drodze, mogą być tylko drobnymi reformatorami, nad którymi ma on już przewagę liczebnością swoich adeptów i wartością swoich twórczych sił... Naturalny rozwój Esperanta dzięki tym siłom z czasem zaprowadzi go dalej i wyżej, niż to widzieć mogą dzisiejsi jego drobni reformatorzy, którzy mniemają, że dla drobniogowego ulepszenia godzi się rozbijać dzisiaj jedność, konieczną dla potężnego rozwoju na jutro młodej jeszcze a drogiej nam wszystkim sprawy.

*Leo Pelmon*

## Eĥoj el la kongreso.

### Postkongresaj tagoj.

Silente kaj malĝoje fariĝis en Drezdeno post la kongreso. La sekvantan tagon post la fermo de nia „kvara“ la urbo por ni esperantistoj kvazaŭ senviviĝis. Verdaj steletoj sur la stratoj renkontiĝis pli kaj pli malofte. La kafejoj, kie ankoraŭ hieraŭ sonis gaja interparolado de esperantistoj, kvazaŭ dezertiĝis kaj nur okaze oni povis renkonti en ili ian malfruintan samideanon, kiu ankoraŭ ne sukcesis forlasi la urbon.

Preskaŭ ĉiuj kongresanoj jam disveturis—unuj hejmen aliaj en Weisser-Hirsch, nian someran tiujaran esperantistujon. La pli granda parto forveturis Berlinon, kie laŭ la anoncita programo devis okazi nova malpli granda kongreso kun la tuta vico da aranĝoj kaj surpizoj.

Ni ne priskribos ĉi tie ĉiujn detalojn de tiu ĉi tre interesa ekskurso en Berlinon. Ni notos nur la pli gravajn faktojn.

Krom la vizitadoj de diversaj vidindaĵoj en Berlino kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, en kiuj partoprenis kelkaj centoj da esper-

antistoj, la atenton meritas du pli gravaj momentoj. Unue—la solena kunveno en „Bürgersaal“ (Urba domo), kie okazis la ĉefa propaganda kunsido.

La kunsidon malfermis ĝia prezidanto prof. Schmidt, salutante ĉiujn kunvenintojn kaj petante pardonon, ke la modesta kunveno en Berlino ne estas tiel brila, kiel ĝi estis dum la neforgeseblaj tagoj en Drezdeno. Post tiu ĉi antaŭparolo de la prezidanto, salutis la kunvenintojn kelkaj germanaj esperantistoj, inter kiuj s-ro Schiff esprimis esperon, ke post la Drezdena kongreso en Germanujo malaperos antaŭjuĝoj kaj indiferenteco al nia afero.

Post tiuj ĉi salutoj sur la parolejo komencis aperadi unu post la alia reprezentantoj de diversaj nacioj. Parolis en la nomo de la Angloj kolonelo Pollen, de la Bohemoj S-ro Kühnl, de la Katalunoj S-ro Puĵula, de la Hispanoj S-ro Alles, de la Francoj, S-ro Sergean, de la Japanoj D-ro Kroita de la Rusoj S-ro Evstifiev. En la nomo de la Poloj parolis la prezidanto de „P. E. S.“ kiu ektuŝis la grandan signifon de Esperanto ne nur

kiel komuna interkomprenigi lo de pensoj, sed ankaŭ de koroj, ĉar gi igas forgesi naciajn malpacojn kaj naskas amon inter popoloj.

Tre interesan kaj belan parolon havis ankaŭ nia nova amiko S-ro Reicher, al kiuj esperantistoj ŝuldas unu el la plej belaj momentoj dum la Drezdena kongreso. Li defendis sin kontraŭ la atakoj de la germana gazetaro kaŭze de la prezentado de „Ifigeniô.“ Li petis la ĵurnalistojn esti singardemaj kaj objektivaj en la juĝo pri tiu ĉi afero.—Ĉiuj aliaj artistoj posedas rimedojn por esti komprenataj de diversaj nacioj: la pentristo havas kolorilon kaj tolaĵon, la muzikisto la sonon kaj notojn, la skulptisto argilon kaj marmoron k. t. p. Nur al aktoroj ĝis nun mankis rimedo por esti ĉie komprenataj, nome: la lingvo internacia. Kiu vidis la „Ifigenion“, scias, ke tiu ĉi malhelpo estas facile forigebla.—La prudenta argumentado, ŝajne, konvinkis multajn ĉeestintojn, ĉar la sekvantan tagon la gazetoj enpresis favorajn raportojn.

La dua, pli grava momento en la ekskurso al Berlino estis la oficiala akcepto ĉe la ministro de la publika edukado. La ministro D-ro Holle ekinteresiĝis multe pri Esperanto kaj petis prezenti al si detalan raporton pri la nuna stato de nia afero. Kiel oni poste eksciis, la germana ministrejo de la publika edukado elsendis neoficiale sian reprezentanton D-ron Rausch al la Drezdena kongreso. La deputataro, kiu prezentis sin al la ministro, konsistis el diversnaciaj esperantistoj, gvidataj de prof. D-ro Schmidt (Generalo Sébert, rektoro Boirac, S-roj: Moscheles, Pollen, Ostrovski, Frenkel, Van der Biert, Fischer, Sandstrom, Sabadell, Kroita, Mybs, Hanauer).

Post la belaj kaj tre interesaj tagoj en Berlino granda nombro da nelaciĝeblaj kongresanoj veturis Kopenhagon, kie ĉi tiea grupo preparis por siaj gastoj belegan kaj koran akcepton.

Ĉe la stacidomo D-ro L. L. Zamenhof estis solene akceptita de la grupanoj kaj kelkaj oficialaj reprezentantoj de la urbo (ankaŭ ĉi tie en la akcepto partoprenis policanoj-esperantistoj). Inter multaj festaj aranĝoj en Kopenhago meritas

atenton antaŭ ĉio la solena akcepto en la urba domo, kie la urbestro alparolis la kunvenintojn en Esperanto. Inter multenombraj ekskursoj estis ankaŭ tre interesa ekskurso al la tombo de Hamleto, (Helsingjör), ekskurso al Svedujo (Helsingborg). Kiel en Berlino, dum la propaganda kunveno parolis la reprezentantoj de diversaj nacioj.

La ekskursintoj sendube neniam forgesos tiujn belajn tagojn plenajn de simpatiaj impresoj, pasigitajn en la rondo de iliaj danaj samideanoj. Ni havis okazon konvinkiĝi ĉi tie, kiel sukcese kreskas nia afero en Danujo, pri kiu en la lasta tempo oni malprave opiniis tute alie.

Speciale por la Kopenhagaj tagoj la fama bierfareja firmo Karlsberg (?) eldonis belegan ilustritan gvidlibron tra la urbo Kopenhago kun malgranda nacia-esperanta frazaro.

Inter aliaj neoficialaj ekskursoj post la kongreso ni notos ankaŭ tre interesajn vizitojn al la urbo Chemnitz (kun D-ro L. L. Zamenhof), Praha kaj Frankfurt kaj eble en aliajn lokojn, ĉar la gastamaj grupoj el diversaj landoj superŝutis nin per tiom da invitoj, ke estas ne eble eĉ memori pri ili.

Tiaj ekskursoj postkongresaj havas por nia afero grandegan signifon. Ili ne estas nur simpla interŝanĝo de afableco kaj agrabla pasigo de kelkaj tagoj,—ili disportas kaj disinokulas nian ideon—instigante la lokajn grupojn al pli fervora agado kaj donante al tiuj samideanoj, kiuj ne povas ĉeesti en niaj tutmondaj kongresoj almenaŭ malgrandan kunvenon de diverslandaj esperantistoj.

Ni esperas, ke la partoprenintoj en tiuj multenombraj ekskursoj ne bedaŭros la perditan tempon se oni nur povas nomi perdita tempo tion, kio alportis al ni tiom da plezuro kaj havis tiom da fruktoporta influo sur nian aferon. Oni jam nun alsendis al ni sciigojn pri la plifortiĝo de niaj progresoj en tiuj landoj, kiuj havis okazon gastigi la kongresanojn. Dume ni povas noti tre gravan por nia afero fakton, kiu montras, kian intereson vekis en Drezdeno nia lasta kongreso. La „Esperanta Instituto“, fondita en tiu



ĉi urbo kalkulas nun preskaŭ 1500 da lernantoj!

Ĉu ni revis pri pli sukcesaj rezultatoj kaj en tiel proksima tempo?

### Nia Ekspozicio.

Specialan, laŭdindan noton meritas nia ekspozicio dum la IV kongreso. Per sia grandeco kaj bonega aranĝo ĝi dece subtenis la ĝeneralan opinion pri la kongreso mem.

Neniam ĝis nun oni vidis tiel zorge kaj bonege kolektitan amason da dokumentoj. Enirante en la vastan bele aranĝitan ĉambron, oni havis impreson kvazaŭ oni vizitus ian grandan ekspozicion. La grandaj muroj kun portretoj, diversaj tabeloj kaj afiŝoj, multenombraj fleksiĝintaj sub la amaso da materialo tabloj faris imponantan impreson eĉ sur tiujn, kiuj havis okazon vidi ne unu esperantan ekspozicion.

En la ĉefa loko staris aparta tablo de D-ro L. L. Zamenhof kun liaj ĉefverkoj, ĉirkaŭitaj de la literaturaĵoj de niaj unuaj pioniroj. Kun vera scivolo kaj avido rigardis la multenombraj vizitantoj, la hodiaŭaj novaj esperantistoj, la verkojn, kiuj aperis nur antaŭ dekelke da jaroj kaj kiuj jam fariĝis raraj birdoj en niaj bibliotekoj. Sur grandega tablo staranta meze de la ĉambro estis orde kolektitaj ĉiuj niaj malnovaj kaj novaj ĵurnaloj kaj apud ili diversaj iliaj eldonaĵoj. Bonan impreson faris angulo de „la Revuo“ kun ĝia multenombra kolekto de niaj plej bonaj verkoj, eldonitaj de la firma Hachette; super tiu ĉi kolekto troviĝas bela honora diplomo ricevita de tiu ĉi organo en unu granda franca ekspozicio de l' gazetaro.

Jen en alia loko okupis sufiĉe grandan angulon „Presa Esperantista Societo“ kun siaj ankaŭ multenombraj kaj bone konataj al la esperantistaro valoraj eldonaĵoj. Jen plena kolekto de Braille'igitaj verkoj por la blinduloj — la bela rezultato de agemeco de la senlaca laboranto en tiu ĉi direkto — s-ro Cart; jen la anglaj eldonaĵoj lukse faritaj de la B. E. A. kaj

de Stead; apude sciencaj, religiaj, sociaj pacifistaj kaj aliaj verkoj.

Vere belegan kaj ĝojigan impreson faras la imponanta vico da naciaj lernolibroj. Ĝi pruvas plej bone nian rapidan progreson en la mondo. Estas neeble noti ilin ĉiujn kaj tamen mankis ankoraŭ kelkaj pli raraj kaj malfacile akireblaj pro la malproksimeco de iliaj landoj. En speciala fako D-ro Hanauer prezentis al ni sian originalan kaj lertan metodon por la instruado de Esperanto.

Kvin tabloj estas kovritaj de ekzempleroj de ĉiuj esperantistaj gazetoj, komencante de la plej malnova „Esperantisto“ (1889 — 1895) ĝis la laste aperintaj „Du Steloj“ kaj „Bela Mondo.“

En alia angulo fiksas la rigardojn la riĉa jam hodiaŭ — nia originala kaj tradukita muzika literaturo kaj tie inter multaj bonegaj verkistoj tronas B-no de Ménil, la konata aŭtoro de nia himno „Espero“.

Estis ne eble rememori ĉion, kion kolektis la lertaj organizintoj de tiu ĉi modela, imitinda ekspozicio. Kiam mi skribas tiun ĉi malgrandan raporton, mi sentas la tutan malforton de mia memoro, kiu ne sukcesis fiksi eĉ etan parton da tio, kion ni havis okazon admirari. Oni efektive perdiĝis en la grandego de la materialo kaj por ĝin detale priskribi oni devus oferi al la ekspozicio multe da tempo, kiu mankis al ni kongresanoj, okupitaj la tutan tagon per senfina vico da laboroj kaj vizitado de aliaj vidindaĵoj.

La Drezdena ekspozicio havas por ni tre grandan instruan signifon.

Ĝi montris al ni unue, ke ni sukcese povas partopreni en diversaj pli grandaj ekspozicioj, estante tute certaj, ke la kolektota de ni materialo ne perdiĝos inter amaso da aliaj prezentataj objektoj kaj fakoj.

Due ĝi konatigis multajn samideanojn kun la grandega progreso de nia afero kaj okulvideble montris al ili la firman enkorpiĝon de nia ideo.

Admirante tiun ĉi imponantan rezultaton de nia dudekjara laboro, oni malgraŭvole rememorigis al si niajn nuntempajn Herostratojn, kiuj tiel senpripense, kun facila animo penas detrui tiun grand-

egan konstruaĵon, kiun post longaj sin-feraj laboroj sukcesis fine starigi homoj batalantaj pro la bela ideo de lingvo internacia.

### „Festo de la Revuo“.

„Festo de la Revuo“, fariĝas kvazaŭ tradicio de niaj kongresoj. La Revuo apartenas al niaj ankoraŭ junaj esperantaj organoj, sed, estante ĵurnalo pure literatura kaj bonege kondukita de ĝia ĉefredaktoro S-ro C. Bourlet, ĝi sukcesis jam okupi unu el la plej honorindaj lokoj en nia gazetaro.

Tiun ĉi jaron „La Revuo“ anoncis tri konkursojn, kies rezultato estis publikigita dum la kongreso en Drezdeno.

La unua konkurso estis malfermita por la plej bona epilogo al la konata noveleto, aperinta en esperanta traduko sub la titolo: „Ĉu la virgulino aŭ la tigro?“ Tiu ĉi bela rakonto de la amerika aŭtoro Stokton estas kvazaŭ interrompita en sia plej interesa momento. Multaj literaturistoj provis jam konstrui al ĝi daŭrigon, sed ĝis nun oni ne ricevis sufiĉe kontentigan solvon de la enigmo kaŝita en tiu ĉi originala noveleto.

Inter tridek manuskriptoj, kiuj venis al la redakcio, nur unu ricevis la premion. Tiu ĉi feliĉa venkinto en la konkurso okazis D-ro S. Krukovski el Varsovio, kiu laŭ tute simpla kaj sprita maniero distranĉis la Gordian tuberon, sur kies solvo pensis tiom da talentaj aŭtoroj. Kompreneble estus vanteco de nia flanko, se ni dezirus fari konkludojn, ke tio, kion ne povis solvi aliaj literaturistoj, solvis la literaturon esperanta. Ni ne rajtas tiel juĝi des pli, ke ni ne konas la solvojn de aliaj neesperantaj literaturistoj. Ni nur povas gratuli s-ron Krukovski, ke li solvis tiun ĉi enigmon kontentige kaj pli bone, ol ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj konkuris kun li en tiu ĉi direkto.

La dua konkurso estis jam ne konkurso literatura, sed tute alia, kvankam tre interesa, sed iom neordinara.

La redakcio de la Revuo deziris ekscii, kiu estas hodiaŭ la plej bona stilisto post D-ro L. L. Zamenhof kaj kiu estas lia plej bona verko. La enketo ne estis facila kaj S-ro Bourlet la iniciatinto de tiu ĉi konkurso mem diris dum la festo, ke li ĝis la lasta momento ne sciis, kiu estos proklamita, kiel plej bona stilisto. La rezultato de tiu ĉi enketo estis jena.

La redakcio ricevis 267 respondojn. El tiu ĉi nombro da voĉoj 194 ricevis D-ro K. Bein (Kabe), 31 D-ro Valienne el Parizo. Ambaŭ estas fame konataj en nia literaturo verkistoj: la unua riĉigis nian literaturon per granda nombro da belaj tradukoj el la pola literaturo, interalie per la traduko de la grandega romano de B. Prus „La Faraono“, la dua, kiel tradukinto de Eneido kaj kiel talenta origala verkinto de du grandaj romanoj: „Kastelo de Prelongo“ kaj „Ĉu li?“

Mi gratulas la ambaŭ venkintojn en tiu ĉi enketo kaj precipe D-ron Bein, nian redakcian komitatanon, pri la aljuĝo al li de la gloro de la plej bona esperanta stilisto post D-ro L. L. Zamenhof.

Mi tamen ne povas preterpasi ĉi tiun konkurson sen ia rimarko. Trarigardante la liston de verkistoj, ricevintaj certan kvanton da voĉoj, mi estis surprizita, rimarkinte la nomojn de kelkaj aŭtoroj malmulte aŭ tute nekonataj en nia literaturo, dume mi vane serĉis la nomojn de niaj kelkaj famaj verkistoj kaj stilistoj. Ĉu oni efektive forgesis pri ili, aŭ la voĉdonintoj opiniis pri ili tute alie, ol la plimulto da esperantistoj? Ni esperu, ke tiu ĉi iom malagrabra okazintaĵo ne senvalorigos la forgesitajn aŭtorojn en la opinio de tiuj, kiuj ilin ĝis nun alte ŝatis. Eble tiu ĉi fakto devigos nin por la estonteco esti iomete pli singarda kaj ne konfidi tiel gravajn enketojn al la laŭvola voĉdonado.

La tria konkurso rilatis la plej bonan verskvaron okaze de la kvara kongreso. La unuan premion ricevis Prof. Paul Christaller el Stuttgart, la duan S-ro L. Elb el Kötzschenbroda, unu el la senlacaj preparintoj de la IV kongreso.

## Tutmonda Esperantista kuracista Asocio (T. E. K. A.).

Antaŭ ol ni raportos pri diversaj novaj fakaj asocioj, fonditaj dum la kongreso, ni donos ĉi tie kelkajn vortojn pri la tre grava je la vidpunkto praktika unuiĝo de diversnaciaj kuracistoj.

Ŝajnas al mi, ke nenia libera fako sentis ĝis nun tiel akre malhelpojn en la interrilatoj kun eksterlando, kiel kuracistoj. Oni de longe jam sentis mankon de ia tutmonda kuracista unuiĝo, bazita sur praktika fundamento. Dank' al Esperanto tio, kio ŝajnis antaŭe preskaŭ neefektivigebla, efektiviĝis nun, dum nia lasta kongreso.

Kompreneble, la organizo estas nur komencita, sed, juĝante laŭ la favora akcepto de tiu ĉi nova asocio eĉ en la rondoj de kuracistoj — neesperantistoj, ni povas profeti al tiu ĉi juna kaj grava unuiĝo bonegan estontecon. Ni ne priparolos ĉi tie la detalojn de tiu ĉi afero, ĉar la plimulto da niaj legantoj ne apartenas al kuracistoj, ni volas nur doni kelkajn necesajn praktikajn informojn al tiuj, kiujn ĝi povas interesi pli proksime.


La T. E. K. A. (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio) havas kiel celon praktikajn interrilatojn inter ĉiulandaj esperantistoj; ĝi faciligas al ĉiuj kuracistoj, apartenantaj al la unuiĝo, helpon en praktikaj kaj sciencaj aferoj, organizas komunajn sciencajn ekskursojn kaj penas pri enkonduko de Esperanto en siajn metiajn kongresojn. La jara kotizaĵo estas 2 Sm. (2 rb): La T. E. K. A. havas sian oficialan organon, dissendatan senpage al ĉiu membro.

Ĉiu lando havas du konsulojn, kiuj elektas reprezentantojn en ĉiuj pli gravaj urboj kaj kuraĉlokoj. Kiel konsuloj por

Polujo estis elektitaj D-ro Krukovski (Elektoralna 31) kaj D-ro Robin (Senatorska 30) ambaŭ el Varsovio. Pli detalajn sciigojn pri la nove fondita Asocio la interesigantoj trovos en la VIII N<sup>o</sup> de Voĉo de Kuracistoj, eliranta en Lvovo sub la redakcio de D-ro Mikołajski (str. Śniadeckich 6).

## Internacia Asocio de instruistoj (I. A. I.),

Dum la kvara kongreso de esperantistoj en Drezdeno estis ankaŭ fondita definitive la I. A. I., post aprobo de la regularo, kiun ellaboris la prepara komitato (s-oj Maréchal, Frenkel, Durieux, Ĉejka). La elektita estraro: D-ro E. Boirac rektoro de la universitato en Dijon (Francujo) — honora prezidanto, Th. Cart, prof. de la universitato en Parizo — prezidanto, frl. de Chalnet (Niderlando), prof. F. Maréchal (Anglujo), R. Frenkel, inspektoro de gimnazio (Siberio) — vicprezidantoj, F. Durieux, direktoro de lernejo (Francujo) — sekretario, Th. Ĉejka, instruisto, — kasisto (Bystrice-Hostyn, Moravio, Austrio — ricevas kotizaĵojn). Dum la kongreso okazis 3 kunsidoj (ĉeestis ĝis 200 personoj). En oktobro 1908 eliros la 1-a No de la „Internacia Revuo Pedagogia“, oficiala organo de la I. A. I., kiu enhavos krom specialistaj artikoloj kaj raportoj pri la kunvenoj de instruistoj en Drezdeno ankaŭ la regularon de la I. A. I. La Revuo estos redaktata (nur en Esperanto) de konstanta kunlaborantaro, konsistanta el diversnaciaj instruistoj kaj pedagogoj. Ĉiu membro, paginta la kotizaĵon 1 Sm. (por 1 jaro), ricevados la Revuon senpage. Por nemembroj jara abono 1.50 Sm. Redakcio kaj Administracio ĉe Th. Ĉejka, Bystrice-Hostyn, Moravio, Austrio.



*Marja Konopnicka.*

# SUR JUNGFRÄU.

Jam blankiĝas mateno  
 Por la ĝoja soleno...  
 Sonas vigle signaloj,  
 Jam vekigas la valoj:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Bruas supro granita;  
 La Junedzo, vekita,  
 Matenruĝon elsendas,  
 Karan vorton atendas:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Iras ar' amikina  
 Al la hejmo estrina,  
 Iras kun la rozfloro  
 Al renkont' de l' aŭroro:  
 — Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

La Junedzo sin zonas,  
 Mondo kantas kaj sonas;  
 Venas jun-amikaro,  
 Grakas roka aglaro:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

— Ĝis nun ombroj ne cedas,  
 Nokto forton posedas;  
 Dormas akvoj en maro,  
 Ĝis nun dormas homaro:  
 — Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

La Popoloj-Lazaroj  
 Songas ĉe la altaroj  
 Pri la tago radia,  
 Reviviĝo la sia:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

La Junedzo atendas,  
 Du riverojn li sendas;  
 Ili iras en landon  
 Kaj ripetās demandon:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Diru, ondoj, resone:  
 Ĝi jam preta duone;  
 Jam sur frunto granita  
 Fajra krono plektita,  
 — Nur ne estas, nur ne estas festa robo finita.

La torentoj refluas,  
 Fermas pordojn, krakbruas;  
 Knaras pordoj el ŝtono,  
 Surde ĝemas resonno:  
 — Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

Vent-orgeno jam bruas;  
 La Junedzo enuas;  
 La Monah', en talaro,  
 Ringojn tenas por paro:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Tra ventegoj, silentoj,  
 Balanciĝas la gentoj;  
 Pasas tempo senlima,  
 Muĝas tondr' malproksima:  
 — Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

En abismoj, vekite,  
 La popoloj ekscite:  
 — Malfermadu! — laŭtkrias,  
 Tag' ekstere radias!  
 — Devas esti, devas esti Junedzino jam preta!

Junedzino nubigas,  
 Per vualo kovrigas:  
 — Ho, malbono ne cedas,  
 Ĝis nun forton posedas!  
 — Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

— Kiam tagon de l' juĝo  
 Korn' anoncos kun muĝo,  
 Kiam kradoj diskrevos,  
 Fundoj lumon ricevos,  
 Kiam levos sin valo,  
 Pintoj krakos dum falo,  
 Juĝa tondro ekbruos,  
 Duon-mondon detruos,  
 — Tiam estos, tiam estos Junedzino vestita!

Esperantigis

*Anton Grabowski*

# El „Dezerto”.

Originale verkis Gorgan.

## La homo pereanta.

Mi estas mortonta — pri mia morto scios nur vulturoj, kiam ili alflugos ĉirkaŭ mia korpo por ĝin manĝi — restos nur nudaj ostoj kaj ili estos brilantaj, ĝis la sablo superŝutos ilin.

Neniu ekploros sur mia tombo — mi pereos, kvazaŭ mi ne estus naskiĝinta!

Kien mi rigardas — dezerto — eterne la sama, netravedebla, potenca, malviva kaj mortiganta! Miaj lacaj okuloj eraras en la surda spaco, ne povante ripozi sur io kaj ili vane penas ekvidi eĉ fajron de vivo inter tiuj ĉi malvivaj elementoj.

Ĉirkaŭe flava, bruliganta sablo — ĝi ruliĝas pelata de vento kaj batas miajn piedojn.

Ho! kiel terura, malviva silento!

La soifo trapenetris jam mian internon!

Akvon! ho akvon! unu guton antaŭ mia morto!

— Dezerte — surde — nur la sablo siblas, kiel serpento kaj ridas mian malforton.

Silento — —

Ho! ĝi iras — — —

La vento iras! terura, varmega vento, kiu sufokas ĉion en la aero — ĝi proksimiĝas kaj jetas, puŝas, pelas la furiozajn ondojn de l' bruliganta sablo.

Akvon! aeron!

La griza sablo premiĝas al mia buŝo, nazo kaj superŝutas miajn okulojn!

Mi sufokiĝas!!

\* \* \*

— La uragano trakuris malproksimen — restis nur senviva silento. Mia horo jam venis kaj mi devas morti.

Ho! kiel la soifo bruligas mian internon!!

Mi mortas kaj jen mia animo elŝiras sin al ci, ho vivo juna! Kie estas vi nun,

songoj miaj — songoj neatingeblaj! Ĉio pasis, nenio restis al mi. Mi estas jen sola inter netravedeblaj vastaĵoj kaj neniu povas doni al mi helpon.

Mi sentas, ke mia fino alvenas — nenia forto savos min de la morto, kaj mian junan vivon mi nur bedaŭras — mi esperis ankoraŭ multe de ĝi — kaj mi estus plenumonta multe da miaj songoj!

Mi adiaŭas vin, ho miaj belaj, ĉarmaj songoj!

(Li ekrigardas malproksimen — subite li eksaltas).

Ho! mi vidas vin!

Al mi! Al mi!

Vi aŭdu min kaj venu por savi min de l' antaŭtempa morto. En ombraj palmoj mi vidas vin, ĉerpantajn la vivdonantan akvon.

Donu al mi guton!

Rigardu!

Jen mi kuŝas tie ĉi de kelkaj tagoj sen akvo kaj manĝaĵo sub la bruligantaj radioj de suno!

Ho! venu al mi!

Ili iras kaj portas akvon en kruĉoj.

Ho! pli rapide! rapidege! al mi!

— Ah!!

\* \* \*

La ruza logo alvenis por veneni per soifo mian lastan momenton.

Nenio estas — malplene ĉirkaŭe — nenio!

Dezerto nur — dezerto netravedebla — granda — potenca — malviva kaj mortiganta — eterne la sama.

Nenio ekzistas — kaj nenie ia ajn signo de vivo. Nur la sablo siblas, kiam aperas pli forta vento — —

Ĉio mallaŭtiĝis.

Ian bruon mi aŭdas...

Super mia korpo ariĝas vulturoj!

Ili sentas morton kaj alflugas por manĝi min.

— Mi mortas — — —



# El „Improvizacio”

de

Narcyza Ŵmichowska.

*He, muziko, dancoj, kanto!*  
*He, glasetoj kaj pokaloj,*  
*Ĉampan vino kaj regaloj!*  
*Ni festenu kun soleno,*  
*Trinku vinon! for ĉagreno!*  
*Tempo flugas—venas morto,*  
*Kaj pri posta homa sorto*  
*La monaĥoj sin ĉagrenu,*  
*Ni de l' vivo ĉarmon prenu,*  
*Kisu, amu kaj karesu!*

*Kaj se iu antaŭ morto*  
*Ne elkisos tutan forton,*  
*Ne eltrinkos tutan vinon,*  
*Ne dorlotos la knabinon;*  
*Kiu vane kaj sen celo*  
*Lasos guton en botelo,*  
*Unu volon en la kor' —*  
*Al li honto, li foriru!*  
*Fulmotondroj lin disŝiru*  
*Cent diabloj kaptu for!*

Kajus.

---

## Al la vespera stelo.

(Romanco de Wolfram el la opero „Tannhäuser“ de Richard Wagner).

*Funebre kovras la krepusko valon,*  
*Etendis nokto nigran la vualon.*  
*Deziras suprenflugi la anim'*  
*Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.*

*Aperas vi, ho stelo la plej kara:*  
*El malproksim' defluas lumo klara,*  
*Disigas ombrojn ĉarma la radi',*  
*Amike montras la vojon al mi.*

*Ravite, ho vespera stel',*  
*Mi vin salutas sur ciel';*  
*Kaj de fidela mia kor'*  
*Salutu ŝin en lasta hor',*  
*Kiam ŝi flugos for de l' tero*  
*Al anĝelar' en supra sfero.*





## Kronika. — Kroniko.

### Ruch esperancki w Polsce.

Podczas trzech letnich miesięcy, które zazwyczaj stanowią sezon martwy dla wszystkich ruchów, Esperanto jednak u nas w kraju zrobił bardzo znaczne postępy. Przedewszystkim winniśmy zanotować fakt oficjalnego otwarcia pierwszej filji „Polskiego Towarzystwa Esperantystów“ w Łodzi. Sekretarz jej p. Dominikiewicz nadesłał nam następujące sprawozdanie z inauguracyjnego posiedzenia.

„Dnia 20 września w sali towarzystwa „Liry“ odbyło się organizacyjne zebranie miejscowych esperantystów. Z liczby zaproszonych przybyło 50 osób. Obecny był na posiedzeniu również prezes „P. T. E.“ p. A. Grabowski. Zebranych powitał p. Ender w esperanckim przemówieniu, w którym dotknął historii, obecnego rozwoju i znaczenia Esperanta dla ludzkości. Mówca zakończył swe przemówienie złożeniem podziękowania p. Grabowskiemu za zaszczytowanie posiedzenia przez swą obecność i poprosił go o przyjęcie przewodniczenia nad obradami. Propozycja została przyjęta przez zebranych oklaskami i p. Grabowski rozpoczął obrady dłuższym przemówieniem, w którym powitał narodziny tej pierwszej córki „P. T. E.“, wróżąc jej dobrą przyszłość i pomyślny rozwój. Łódź, zdaniem mówcy, jako miasto handlowe, gdzie zbiegają się interesy wielu narodowości, przedstawia jedno z najpodatniejszych miejsc dla języka międzynarodowego. W dalszym ciągu nastąpiło odczytanie regulaminu i składanie deklaracji na członków. Deklarację podpisało 40 osób. Wybory do zarządu dały następujący wynik. Na prezesa największą liczbę głosów otrzymał prof. Lipski, który jednak zrzekł się tego zaszczytu na rzecz p. Endera najstarszego esperantysty w Łodzi, który otrzymał następującą liczbę głosów. Prof. Lipski pozostał przy godności wiceprezesa. Reszta miejsc w zarządzie została podzielona między pp.: Dr Goldenberg (bibliotekarz); p. Miszewski (skarbnik) i p. Dominikiewicz (sekretarz). Jako zastępcy zostali wybrani pp.: Tymowski, Knapski i Pfeiffer; do komisji rewizyjnej weszli Dr. Skalski, pani Grzybowska i p. Kowalski. Po dokonaniu wyborów omówiono kilka propozycji członków i posiedzenie zostało zamknięte”.

Z okazji otwarcia tej pierwszej filji „P.T.E.“ ślemy naszym łódzkim towarzyszom idei serdeczne życzenia; mamy nadzieję, że propaganda Esperanta w tym mieście, która dotychczas była utrudniona z braku oficjalnego zezwolenia, rozkwitnie szybko i stworzy nam dla naszej sprawy w Polsce nowe poważne ognisko na wzór Warszawy, Lwowa i Krakowa.

### Pola Esperantista movado.

Dum la tri someraj monatoj, kiuj ordinare estas mortsezono por ĉiuj agadoj, Esperanto tamen en nia lando faris sufiĉe grandan progreson. Antaŭ ĉio ni devas noti, kiel gravan fakton, la oficialan fondon de la unua filio de la „Pola Esp. Societo“ en Łódź. La sekretario de ĉi tiu filio S-ro Dominikiewicz sendis al ni la sekvantan raporton.

